

Hector Hodler kaj la propagando de Esperanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 februaro 05 kaj 07

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ni daŭrigas nian raporton pri la penso de Hector Hodler, kiu fakte naskiĝis antaŭ cent jaroj.

En la Esperanto-literaturo la temo "propagando" okupas gravan lokon. Estas neimageble kiom da paroladoj, artikoloj, eseoj, poemoj eĉ, estis dediĉitaj al tiu priokupo. En la artikola verkaro de Hector Hodler tiu ĉi temo ankaŭ ekzistas. Père de citaĵoj, ni ekzamenus la sintenon de la fondinto de UEA.

A.- Ĉefe tri artikoloj titolitaj "Nova tempo - Novaj metodoj", "Ciferoj" kaj "Du danĝeroj" aperintaj en februaro 1909 kaj majo kaj julio 1911 en la revuo **Esperanto** donas ideon pri la sinteno de Hector Hodler. Al la tiamaj propagandistoj li riproĉas tro teorian argumentadon, kie la lingvaj demandoj okupas ĉeflokon. Li provas komprenigi, ke la esperantismo estas ne nur lingva, sed ankaŭ socia fenomeno. Kaj kontraŭ ĉia blufado kaj la tro oftaj troigoj ciferaĵoj li vigle reagas. Li opinias, ke ĉia predikado estas vana, dum la praktikado de la esperantismo kreas dinamismon, kiu altiras novajn fortojn al Esperanto. Sed ni ĉesu resume prezenti la ideojn de Hector Hodler, profite al citado de la plej signifaj partoj el liaj artikoloj:

Cl.- "Se vi trovas, ke Esperanto ne progresas sufiĉe rapide, tion kaŭzas ne la fakto, ke via propagando estas malbone aŭ ne sufiĉe organizata, sed ĝi male devenas el tio, ke vi tro multe propagandis Esperanton kaj ne sufiĉe ĝin uzis; vi parolis pri bela estonta palaco, sed vi apenaŭ konstruis ĝian fundamenton. Vi predikis pri la utila rolo, kiun havos Esperantismo por la estonta homaro, kaj vi eĉ ne pensas pri tiu, kiun ĝi povas havi en nia nuna Esperanta homareto. (julio 1911)

A.- "Prediko, kiel ajn elokventa kaj brila, por Esperanto havas malpli da praktika utilo, ol vojaĝo per Esperanto aŭ peresperanta parolado pri tute alia temo. Anstataŭ prezenti al la publiko tion, kio okazos kiam la tuta mondo estos nia, kiel oni tro ofte faras, ni montru al ĝi tion, kio okazis kaj okazas. (julio 1911)

Cl.- "Niaj propagandistoj ne timu klare konigi la socian signifon de Esperantismo, la neeviteblan plisolidarigon, kiun rezultigas tiu senĉesa reciproka servado kaj alproksimiĝo sur neŭtrala kampo, kie ĉiuj homoj juste kaj egale interkomunikas, kiu ajn estas ilia lingvo, nacio, opinio, kaj cetere. En tiu rilato la ekzemplo de niaj kongresoj estas plej interesa. La socia karaktero de nia movado, jam konkretigita de niaj diversaj servoj, multe pli interesos la popolamasojn, ol longaj klarigoj pri la helplingva problemoj kaj ĝiaj diversaj solvoj. (februaro 1909)

A.- "Oni forlasu la blufon de la nomoj de eminentuloj, sciencaj aŭ registaraj, kiuj okaze ellasis favorajn vortojn pri Esperanto, sed praktike tre malmulte interesiĝas pri ĝi.

Cl.- "Ekzistas personoj, kiuj ne ŝatas la ciferojn. Ili pli volonte aŭskultadas belsonajn frazojn kaj volupte lasas sin luladi per promesplenaj paroloj pri glora estonteco. Ju pli malproksima de la realeco estas la afero, des pli plaĉas ĝi al ili. Aliaj homoj ekzistas, kiuj iafoje uzas ciferojn, sed kondiĉe ke ĉi tiuj submetiĝu al la ludo de ilia trograndigema fantazio. Ili sentime

ripetas, ke ekzistas du aŭ tri milionoj da Esperantistoj: ili konsideras kiel realaĵon tion, kion ili deziras. La miloj kaj milionoj anstataŭas la dekojn kaj centojn. Tamen, kiom da intereso en la sekaj veraj ciferoj ! Senmelodia, senideala, severa, ofte kruela estas ilia lingvo, sed ĝi havas la certecon, la potencon, la superecon de la realeco. Sole per ĝi ni povas apartigi la seriozon de la neseriozo, la krudan veron de la ĝin kaŝantaj ornamoj. Precipe mortiga malamiko de la blufi ĝi estas.

A.- "La ĉarlatanoj devas aŭ silenti pri la ciferoj aŭ ilin falsi... Tiu esperantista senmezura, propagandisto fanfaronas pri la ekzisto de 110 aŭ 120 Esperantaj gazetoj sed li neniam demandis al si kiom da legantoj tio reprezentas. Ni timis la ciferojn, ĉar ili tro precize montris al ni la distancon inter la nuna realaĵo kaj la celo. Tio devenis precipe el la fakto, ke en la unuaj jaroj ni kredis, ke Esperanto utilos nur kiam la tuta civilizita tergloba aliĝos al ĝi. Tiu malkuraĝiga opinio feliĉe estas malaperanta : ni povas utiligi Esperanton kun niaj nunaj fortoj. Ni paŝas en la kampo de la realaĵo kaj en ĝi la ciferoj reakiras sian tutan valoron.

Cl.- "Kiel procedis niaj propagandistoj, ĉu en la paroladoj, ĉu en multegaj artikoloj verkitaj de ili? Ili komence montris la necesecon de lingvo internacia, klarigis kial (pro teoriaj kaŭzoj) lingvo internacia povas esti nek mortinta lingvo, nek nacia lingvo, fine kial Esperanto, pro ĝia simpleco, ĝia logikeco, unuvorte ĝiaj lingvaj ecoj, kaj lastatempe, pro ĝia jama disvastiĝo, estas la sole bona solvo de la problemo, ke, konsekvence, ĉar lingvo internacia estus utilega al la tuta homaro kaj Esperanto estas la plej bona solvo, ĉiu homo havas la moralan devon lerni Esperanton kaj ĝin disvastigi. Oni postulis do la publiko ian penadon por afero pure eventuala kaj estonteca: interŝanĝe oni proponis al ĝi aŭ nenion, aŭ tute ne certajn kaj ne precizajn profitojn. Memkompreneble oni ne povas nei, ke en la komenco, oni malfacile povas agi alie.

A.- "Kiel do povas agi nun la propagandisto, kiu sin turnas al la publiko. La propagandisto povas paroli pri la lingvo, montrante, ke ĉar la plej granda baro al la celo de UEA estas la diverslingveco, tiu organizaĵo, kiel ĉiuj Esperantistaj organizaĵoj, uzas nur unu lingvon, nome la lingvon Esperanto, kies fundamentajn principojn li tiam povas klarigi kaj pri kiu la sperto pruvis, ke ĝi plenumas sian rolon en maniero tute sufiĉa." (februaro 1909)

Cl.- Konklude al tiaj kelkaj citaĵoj el artikoloj de Hector Hodler, ni povas diri, ke la fondinto de UEA decidige influis la poresperantan argumentadon, instigante la propagandistojn ĉefe raporti pri la socia valoro de la esperantismo, anstataŭ nur teorie pri lingvaj problemoj. La posthodlera propagando malsimilas al la antaŭhodlera: ĝi fariĝis pli konkrete realisma, kio signifis grandan paŝon antaŭen.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la influo de Hector Hodler al la propagando de Esperanto. Ĝis reaŭdo !